

Gazeto 
 *Andaluzia*

Andaluzio per si, por Hispanio kaj la Homaro

30-a Jarkolekto * Decembro 2016 * N-ro 103

ISSN 1576 - 0618



LANJARÓN

historio kaj akvo elfluas el la tero

Gazeto Andaluzia

Fundada por D. José Garzón Ruíz, en San Fernando (Cádiz) en 1910.

Órgano oficial de la **Asociación Andaluza de Esperanto**.

EDITA: Asociación Andaluza de Esperanto

REDACCIÓN: C/ Anfora 6 5-D 29013 Málaga (Hispanio)

DEPÓSITO LEGAL: MA-1136/86. ISSN: 1576-0618.

IMPRIME: Litopress SL Córdoba

DIRECTOR: Ángel ARQUILLOS LÓPEZ

REDACTOR: José María RODRÍGUEZ HERNÁNDEZ

(esperanto14@ono.com)

ENHAVO

Esperanto en Andaluzio	3
Eksterordinara ĝenerala kunsido de AEU	6
Stipendio “Felipe González del Pino”	8
Ĉu politikistoj nepre devas paroli la anglan lingvon?	9
<i>Sierra Morena</i> , la montaro de la romiano Seksto Marjus	13
Poezia Angulo	16
Lingva Angulo	17
Turismi en Lanjarón	20
Paĝoj pri nia Historio	24
Flamenko	26
Andaluzia Kuirarto	28
Misteroj kaj legendoj de Andaluzio	30
Krucvortenigmo	32
Humuro	34

Noto: pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

La redaktoro rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn.



ESPERANTO EN ANDALUZIO



SEVILO

★ La pasintan 15-an de decembro, la Zamenhof-Tago, membroj de Sevila Esperanto-Asocio renkontiĝis okaze de nokto-maĝo. Ĉeestis ankaŭ kelkaj gelernantoj el la bazaj kaj mezaj kursoj nun okazantaj en Seviljo.



★ Informo pri Babelo-Filmoj aperis dum la plej grava inform-programo de la andaluzia oficiala televido CanalSur la pasintan 15-an de januaro. La ĉefa temo de la informo estis la ekzisto de jutuba kanalo produktata en Seviljo, celanta realigi filmojn por instrui la internacian lingvon ĉefe al infanoj. Dum la kelk-minuta informo aperis la jam fama en la tuta mondo *Dek Bovinoj* kaj ankaŭ intervjuo al Fran LOBATO, la ĉefa produktanto de Babelo-Filmoj kaj al Gonzalo CARRASCO, kiu parolis iomete pri esperanto. La sinteno de la

intervjuo kaj la informoj estis tute favoraj al nia lingvoj kaj la ĵurnalisto eĉ kuraĝis diri kelkajn numerojn en esperanto: *unu, du, tri...*

Videbla ĉe:

<http://www.canalsur.es/noticias/una-productora-andaluza-revolucionael-mundo-del-esperanto-en-la-red/1131587.html>



Rilata al tiu lasta informo estas plezuro sciigi, ke Babelo-Filmoj produktis novan laboron okaze de la kristnaskaj festoj, vizitu: <https://www.youtube.com/watch?v=YYUnbB0wdCk> . Temas pri la tipa hispana kristnaska kantaĵo “*La fiŝoj de l’rivero*”, kiu tradukita de Liven Dek estas kantita de infana ĥoro de la rusia alt-lernejo “Rimski-Korsakov”. La fina rezulto, kiel ofte ĉe Babelo-Filmoj, belega kaj mirinda. Bv. reagi ĉe la oficiala jutuba kanalo de Babelo-Filmoj.

★ Organizata de la profesoro de la Universitato de Sevilo, Vicente Manzano-Arrondo, komenciĝis en la Fakultato pri Psikologio instruado pri statistiko. La studentoj devas plenumi kelkan laboron uzante statistikon kiel socian utilan ilon, la profesoro proponis du temoj kaj unu el ili estas pristudi la temon “*Esperanto kiel liberigilo pri lingva justeco*”. La lernantaro grupiĝos po 3-5 membroj kaj ili intervjuos aliajn studentojn de aliaj Fakultatoj (Edukado, Juro, Ekonomio kaj Filozofio) rilate iliajn konojn pri la angla lingvo; iliajn sintenojn pri

lingva justeco ĝenerale, kaj specife pri la angla; ilian konon pri Esperanto kaj fine pri eblaj uzoj de la internacia lingvo kaj eblecojn uzi ĝin.

VIZITO DE IRANA ESPERANTISTO

★ Saed ABBASI estas irana esperantisto loĝanta nun en Ĉinio, li ankaŭ stuas la kurson “Instruista Trejnado” en la Universitato de Poznan en Pollando. Post stud-sesio en Pollando li decidis veni en Madridon kaj poste en Andaluzion. Li vizitis Malagon kaj Kordovon. En ambaŭ urboj li kontaktis kun la tieaj esprantistoj kiuj akompanis lin tra la ĉefaj strato de tiuj urboj.



Saed Abbasi

kun geesperantistoj en la kafejo “Esperanto” en Malago: Carlos Spinola, Juan García del Río, Mariló Torres kaj Ángel Arquillos.



ĜENERALA EKSTERORDINARA KUNSIDO DE ANDALUZIA ESPERANTO UNUIĜO

La 18an de marto 2017 okazis en la Fakultato pri Informadiko de la Universitato de Malago, la eksterordinara ĝenerala kunsido de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo. Sekve la traktitaj temoj kaj la decidoj aprobitaj:

1. La ĉeestantoj aprobis la akton de la antaŭa kunveno.

2. Oni komentis la okazigon kaj disvolvon de la pasinta Andaluzia Kongreso en Antekero. Ĉiuj opiniis pri la sukceso de la programo kaj programeroj. Elstarindas ankaŭ la tre kontentiga nombro da ĉeestantoj. La Prezidanto memorigis la oferon de la nuntempa urbaj respondeculoj de Antekero por la okazigo de hispana kongreso en venontaj jaroj. Do, AEU pripensas la eblecon peti la organizadon de Hispana Kongreso de Esperanto, samtempe al la okazigo de plia Andaluzia Kongreso, en Antekero en la jaro 2019.

3. Se paroli pri Kongresoj, sekve oni debatis pri la organizado de la venonta Andaluzia Kongreso de Esperanto. La partoprenantoj en la kunsido decidis okazigi tiun 21an Kongreson en la urbo Torokso (Malago), pro la fakto, ke en la jaro 2017 okazas la 30a datreveno de tiu sukcesa kongreso okazinta ankaŭ en Torokso en la jaro 1987. La temo de la Kongreso estos: *Esperanto, kiel turisma lingvo*. Do, kelkaj prelegoj kaj programeroj pritraktos la rilaton de la internacia lingvo kun la tutmonda turismo. Oni decidis, ankaŭ, organizi dum la Kongreso programeron por omaĝi nian karmemoran samideanon Antonio González Álvarez, kiu senĉese disvastigis la internacian lingvon en Torokso dum la 80-a kaj 90-a jardeko. Dum la Kongreso ankaŭ oni festos la 30an datrevenon de la eldonado de la libro “*Pandemonio*”, unua verko eldonita de nia Asocio kaj elirejo de kelkaj postaj literaturaj gravuloj en nia lingvo.

4. Poste la ĉeestantoj debatis pri la periodaĵoj eldonitaj de nia asocio: *Gazeto Andaluzia* kaj *Bulteno de AEU*. La redaktoro de *Gazeto*

Andaluzia prezentis la nunan staton de la revuo, kiu post kelkaj jaroj da ne-regula aperado, dum la jaro 2016 ĝi aperis enorde kaj post kelkaj monatoj eĉ aperos tute akurate. Li prezentis ankaŭ projekton celantan aperigi ĉiujn jam eldonitajn numerojn en interreto. La redaktoro de *Bulteno de AEU* ankaŭ parolis pri la neceso ricevi pli da kunlaboraĵoj en la bulteno de nia asocio.

5. La kasisitino prezentis tre favoran ekonomian rezulton por la asocio dum la jaro 2016, ĉefe dank'al la kotizoj de la kongresanoj en Antekero kaj al la disvendado de libroj. Ŝi ankaŭ sciigis pri la neceso plialtigi la nombron da membroj de AEU kiuj pagas efektive kaj regule la jaran kotizon.

6. Ĉi-jare la kunsido estas eksterordinara, tio signifas, ke oni devas elekti novan estraron, aganta dum la periodo 2017-2019. La rezulto estis jena:

- Prezidanto: Ángel Arquillos López. (Malago)
- Vicprezidantino: Fátima Jiménez García. (Arundo)
- Kasistino: Mariló Torres Mateo. (Malago)
- Sekretario: José María Rodríguez Hernández (Kordovo)
- Voĉdonantoj: Jordi Lietor López. (Almerio)
Antonio Rodríguez Gasch. (Sevilo)
Juan García del Río. (Malago)

7. Fine estis momento por prezenti petojn kaj demandojn. José María Rodríguez proponis oferi al la samideanaro, ĉefe eksterlanda, la eblecon aboni al la revuo sen la neceso aparteni al la Asocio. Tio, sendube, plialtigus la nombron da ricevantoj de nia periodaĵo. La ĉeestantoj aprobis la projekton. Alie, la ĉeestantoj debatis pri nia nuntempa ret-loko, kiu devas esti aktualigita kaj plie diskonigita. Tiel, oni decidis, ke dum la jaro 2017 la situo: www.esperanto.ac estoss profunde aktualigita. Fine, oni decidis oferi denove al andaluziaj geesperantistoj la stipendion “Felipe González del Pino”, pro la fakto, ke komenciĝos nova kurso pri Esperanto kaj Interlingvistiko en la Universitato Adam Mickiewicz en Poznan (Pollando).

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo kunvokas
“Stipendion Felipe González del Pino”
por realigi studojn pri Esperanto kaj Interlingvistiko
en eksterlandaj universitatoj

Cele la promocion kaj konon de esperanto kaj interlingvistiko fare de andaluziaj universitatoj, Andaluzia Esperanto-Unuiĝo fondis en la jaro 2014 la stipendion “Felipe González del Pino”, omaĝe al sevila profesoro de esperanto. La unuan stipendion en tiu jaro ricevis S-ino Fátima Jiménez García, kiu sekvis studojn pri esperanto kaj interlingvistiko en la Universitato Adam Mickiewicz de Poznan (Pollando). Nun, en marto 2017 ni kunvokas novan stipendion laŭ la jenaj bazoj:

- 1) La celo de la stipendio estas pagi la vojaĝojn kaj restadon en la urbo Poznan de andaluzia universitato, kiu aliĝus al la nova kurso pri esperanto kaj interlingvistiko, komenconta en tiu universitato la venontan monaton septembron.
- 2) AEU helpos andaluzian universitatanon, nun studanta en kiu ajn universitato aŭ tiu kiu jam finis siajn universitatajn studojn. Tute ne gravas, pri kio li studas, sed kompreneble helpos se la studoj iamaniere rilatas al lingvistiko, literaturo, filologio, ktp.
- 3) Nepre, la kandidato naskiĝis aŭ loĝas en Andaluzio.
- 4) Rilate la kostojn de la aliĝo al la Universitato, oni kalkulos kun la helpo de *Esperantic Studies Foundation*. Kiel dirite, la stipendio de nia asocio pagos la vojaĝojn kaj restado en Poznan. La kurso daŭros 3 jarojn kaj la kandidato devas kompromisi ĉeesti en Poznan dufoje en la jaro, februaro kaj oktobro, proksimume dum dek tagoj en ĉiu sesio.
- 5) Se al Vi interesas atingi ĉi tiun stipendion, bv. sendi leteron, antaŭ la 30-a de junio 2017, kune kun Via karier-tabelo, al jena adreso:
 - becafelipegonzalezdelpino@ono.com

Ĉu la politikistoj nepre devas paroli la anglan lingvon ?

La teorio Gromiko

Kiam okazas en Hispanio elektada kampanjo tuj aperas sur la amas-komunikiloj informoj pri la vivo kaj konoj de la kandidatoj. Tiel, oni parolas pri iliaj studoj, familioj, sukcesoj, fiaskoj kaj ankaŭ vole-nevole aperas informoj pri ilia kono de la angla lingvo. Ĉu por lerte regi Hispanion, por prizorgi la kondiĉojn de la enloĝantaro aŭ por kreskigi la riĉecon estas necese koni la anglan lingvon? Ĉu estas konvene regi nur la anglan lingvon?

Verdire, kiam eksterlanda politikisto venas en Hispanion estas agrable aŭskulti lin en nia nacia lingvo, tamen tio ne pruvas la fakton, ke li estas pli aŭ malpli bona reganto. La kono pri lingvoj montrus nur lian kleran kulturon kaj liajn dezirojn prezenti bonan impreson pri li mem kaj lian landon, kio ja estas tre grava ĉe la internaciaj rilatoj. Kompreneble, se la hispana reĝo, la ĉefministro aŭ kiu ajn ministro vizitas Italion, Portugalion, Svedion, Rusion... estus tre konvene paroli al la amas-medioj kaj al tiu nacia parlamento en la tiea nacia lingvo, ne en la angla lingvo.

Oni asertas, ke en la nuntempa mondo paroli la anglan lingvon ne estas nur avantaĝo, sed nepra kondiĉo por ĉiuj. Tamen, estus konvene koni kiu verkis aŭ diris tion, sendube la aŭtoro de tiu diraĵo estis politikisto, ekonomiisto aŭ sciencisto angla aŭ usona kaj se paroli pri avantaĝoj kaj kondiĉoj, sendube la plej necesaj estas tiuj kiun ni jam posedas ! ... La ceterluloj lernu tion kion mi jam regas !

Jes ja, hodiaŭ la angla lingvo estas la idiomo de la internacia komerco kaj de milionulaj investoj, sed ĉe la politikista medio paroli la anglan lingvon, fare de ne angla-lingvano, estas malavantaĝo.



Andreo Gromiko
1909 ~ 1989

Tion pravigas teorio de Andreo Gromiko, ministro pri eksterlandaj aferoj de la eksa Sovet-Unuiĝo. Andreo Gromiko, jam tridekjaraĝa, estis konsilisto de la Ambassadejo de USSR en Usono kaj poste fariĝis tie ambasadoro, do li loĝis dum multaj jaroj en Usono kaj regis la anglan lingvon perfekte. Li ĉiam uzis la anglan lingvon okaze de intervjuoj kun usonaj amas-medioj kaj okaze de ne-formalaj renkontiĝoj. Tamen, kiam okazis gravaj internaciaj konferencoj aŭ diskutoj en la Konsilio pri Sekureco de Unuiĝintaj Nacioj, li ĉiam uzis sian nacian lingvon: la rusan, same

pri aŭskultado de aliaj politikaj reprezentantoj angle parolantaj, li tiuokaze preferis aŭskulti kaj paroli al ili pere de oficialaj tradukistoj de UN.

Iufoje ĵurnalisto demandis al Gromiko kial li uzis la rusan lingvon kaj ne aŭskutis rekte la paroladoj de angla-lingvanoj ĉe Unuiĝintaj Nacioj, malgraŭ la fakto, ke li regis perfekte la anglan lingvon. Lia respondo estis simpla kaj praviga: *se oni parolis pri gravaj aferoj ĉiuj devas uzi sian patrinan lingvon, ĉar tiu estas la plej natura komunikilo pri kiu ni disponas. Tiel, se mi parolus la anglan lingvon mi neniam povus uzi ĝin je la sama nivelo ol la usona ambasadoro. Do, kiu ajn devas esprimi sin en sia propra lingvo kaj ni devas lasi la aferon traduki la paroladojn al la tradukistoj, kiuj estas kapablaj kompreni kaj komprenigi eĉ la plej minimumajn detalojn en konversacio.*

Tiu opinio ŝajnas prava. Se hispana ĉefministro uzas la anglan lingvon dum la renkontiĝoj de Eŭropa Unio li neniam povos esprimi cent-procente ĉion kion li deziras sciigi. Do, li estus en malavantaĝo rilate tiujn politikajn reprezentantojn kies patrino lingvo estas la angla.

Ni ne forgesu, la *“relaxing cup of café con leche in Plaza Mayor”* de Ana Botella, urbestriino de Madrido, kiam ŝi prezentis sian urbon kiel kandidaton ĉe la Internacia Olimpika Komitato. Ĉu ne estus pli konvene diri *“una relajante taza de café con leche en la Plaza Mayor”*, tiel hispan-lingve, kaj poste la interpretistoj tradukus tiun frazon al ĉiuj lingvoj de ĉeestantoj, ne nur al la angla-lingvanoj ?



Do, okaze de gravaj konferencoj kaj diskutoj la angla-lingvan nivelon de reprezentantoj ne anglaj/usonaj oni ne povas kompari al tiu ja de angla-lingvanoj. Kaj tio ne temas pri malkono de konkreta lingvo sed pri nia deziro sciigi kaj komuniki niajn argumentojn okaze de parolado kiel eble plej efike. Tiujn argumentojn ni devus prezenti en lingvo kiun ni uzas ĉiutage. Tion mem opiniis la franca eks-prezidanto N. Sarkozy kiu, kvankam scipovanta la anglan lingvon, li ĉiam uzis la francan okaze de ĉiuj renkontiĝoj en Eŭropa Unio.

Do, la kono pri la angla lingvo fare de hispanaj politikistoj ne devus esti grava afero okaze de balotado, ali afero estas la kono ne nur de la angla lingvo sed ankaŭ de aliaj, ĉar tio pruvus la klerecon de la politikistoj. Tamen, ĉu nur la angla lingvo? Tute ne ! La hispanaj politikistoj ne nepre devas paroli la anglan lingvon, eĉ pli bone se ili ne uzas ĝin okaze de internaciaj konferencoj.

Ĉu Vi ankoraŭ ne fariĝis membro de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo ?

Se Vi deziras:

- ★ kunlabori en la disvastigo de la internacia lingvo Esperanto en Andaluzio kaj
- ★ helpi la diskonigon de la andaluzia kulturo en la esperantista mondo.

Jen Via Asocio

Koston de la kotizo kaj adreson de nia asocio Vi trovos sur la paĝo 22-a. Nun ni informas, ke ĉi-jare ĉiuj membroj de nia asocio ricevos senpage jenan donaceton:


- 8 Gb menor-bastonon, tute senpaga por niaj membroj.

Do, ne hezitu aliĝi al Andaluzia Esperanto-Unuiĝo. Esperanto estas bona ideo kaj alloga projekto, kunlaboru en ties disvastigado.



Sierra Morena, la montaro de la romiano *Seksto Marjus.*

Sierra Morena, en esperanto tradukita kiel “Bruna Montaro”, estas monto-ĉeno en la nordo de Andaluzio, kiu separas la valo de la rivero Gvaldalkiviro de la Centra Altebenajo. Se ni parolas pri geologio, ni diru, ke ĝi temas pri la bordo de la altebenajo rompita kaj levata de la premo de Alpaj fortoj super la hercinia soklo de la Altebenajo. Ĉi tiu monto-ĉeno entendas en Andaluzio laŭ la nordo de la provincoj Onubo, Sevilo, Kordovo kaj Jaeno kaj ĝi estas la natura limo ĉe la nordo de Andaluzio.



Ni diris, ke la laŭvorta traduko en esperanto de la nomo de la monto-ĉeno estus “Bruna Montaro”, jes, en la hispana lingvo *Morena* egalas al la esperanta *Bruna*, ĉi tiel, pere de ĉi tiu nomo ni povus eble imagi brunajn pejzaĝojn aŭ tiukolorajn rokojn. Tamen, tute male, la nomo “*Morena*” (*Bruna*), de la monto-ĉeno ne devenas el la koloro, sed ĝi estas adaptiĝo de la nomo de la romiano Seksto Marjus (aŭ Marjanus). Kiu li estis?

Kiam la romianoj konkeris la Iberan Duoninsulon, ili profitis la teritorion pro atingi nutraĵojn. Dank’al la tiutempa *Hispania* la

romianoj provizis la tutan Imperion per grejno. Ili, same, eltiris la grandajn minejajn riĉaĵojn troviĝantajn en la Duoninsulo, ĉefe en la suda provinco *Betis*, nuntempa Andaluzio. Proksimume en la jaro 180 a.K. romiaj negocistoj venis en Hispanion kaj ili organizis la eltiradon de la mineraloj bezonataj en la Imperio. En la nuntempa Bruna Montaro ili trovis arĝenton kaj kupron. La greka geografiisto Strabono eĉ mencias la monton el arĝento kiu troviĝas ĝuste antaŭ la rivero *Betis*, nuntempa Gvadalkiviro.

Unu el tiuj proprietuloj de la minejoj estis la kordova patriko *Seksto Marjus* (aŭ *Marianus*) el la gento *Marii*. Li naskiĝis en la urbo Kordovo, tamen li loĝis preskaŭ dum sia tuta vivo en la romia ĉefurbo, tie li estis granda amiko de la imperiestro Tiberjo. Li posedis en la Bruna Montaro minejojn kiuj produktis oron kaj arĝenton kaj lia ekonomia povo estis tiel granda, ke li eĉ pagis la konstruon de la romia teatro en Kordovo.



La imperiestro Tiberjo sur arĝenta monero.

Tamen pro tiu riĉeco mem li ankaŭ havis grandajn malamikojn. Unu el ili estis la senatano Kalpurnjo Salvjano, kiu denoncis la kordovan patrikon antaŭ la imperiestro en la jaro 25 p.K. Seksto Marjus uzis sian amikecon kaj influon ĉe la imperiestro Tiberjo kaj feliĉe li restis senkulpa kaj la senatano forpelita el la romia Senato. Sed, en la jaro 33 p.K. la bonŝanco kaj influo de nia kordova patriko sangiĝis. En tiu tempo la ekonomio de la Romia Imperio estis tute disbatita, onidire ĉe la imperia trezoro troviĝis nur cent mil sestercoj, la imperiestro mem pruntedonis antaŭe sian monan kapitalon kaj li ricevis nenian kontraŭpagon pro la ĝenerala ekonomia krizo. Do, estis urĝe por la ekzisto de la Imperio mem atingi monon.

La imperiestro pripensis la eblecon plialtigi la impostojn al la romiaj civitanoj, tamen tio ne estus populara decido kaj verŝajne la romianoj ekribeliĝus kontraŭ la imperia povo. Tiam, Tiberjo ektrovis solvon. Unue, estas necese diri, ke la riĉaĵoj kaj proprietaĵoj de tiuj kondamnitaj de la imperiestro pasis aŭtomate al la trezoro de la Imperio. Do, la imperiestro inventis akuzon kontraŭ la riĉega kordova patriko Seksto Marjus pro incesto kiu fine ricevis morto-punan kondamnon. Li mortis enpuŝita en la monto Tarpejo en Romo. Finiĝis tiel la vivo de romia nobelo kaj saviĝis samtempe la ekonomio de la Imperio, ĉar la tuta mono kaj la minejoj de Seksto Marjus ekde lia morto apartenis al la Imperio. Ni memoru, ke la historiisto Tacito diris pri la kordova patriko, ke li estis la plej riĉa el la hispanoj.

Seksto Marjus mortis, tamen lia nomo restas ĉe kelkaj geografiaj nomoj en Andaluzio, inter ili *Sierra Morena* mem, sed ankaŭ la urbo *Cerro Muriano* en Kordovo kaj la urboj *Mairena del Alcor* kaj *Mairena del Aljarafe* en Sevilo.



Romia reliefo eltrovita en “Los Palazuelos” (Jaeno). Ĝi montras ministan grupon.

**75-a datreveno de la morto de la poeto
MIGUEL HERNÁNDEZ
1910 ~ 1942**

LA VUNDITO

Por la liber' mi sangas, batalas, vivas plue.
Por la liber' okuloj kaj manoj miaj bonas.
Mi ilin, karnan arbon en ĉel', sindonan, ĝue
al la kirurgoj donas.

Por la libero sentas mi pli da koroj bruste,
ol da sablejoj: donas la vejnoj ŝaŭmo-striojn,
mi iras hospitalen kaj en kotonon ĝuste
sam-kiel en liliojn.

Por la libero pafe seniĝas mi je uloj
trempintaj ĝian bildon en koto plej obstine.
Kaj mi seniĝas bate je miaj brakoj, kruroj
kaj dom', je ĉio fine.

Ĉar, se aperos iam du kavoj sekaj, haste
liveros ĝi du ŝtonojn vidontajn, alt-kvalitajn,
kaj igos novajn brakojn kaj krurojn kreski draste
sur karnoj dishakitaj.

Burĝonos kun flugiloj el limfa flu' konstanta
relikvoj mia-korpaj, kiuj travunde drivas.
Ĉar estas mi frukt-arbo hakita burĝonanta:
ĉar mi ankoraŭ vivas.

Miguel Hernández
(*Esperantigis: Miguel Fernández*)



Lingva Angulo

KROM

KROM estas prepozicio, signifanta, ke oni metas aparte la sekvantan ideon. Tamen, ĉi tiu vorto havas du kernajn signifojn kiuj unuavide povas esti eĉ kontraŭaj. Ni vidu:

- **Escepta KROM**

Ĉi –kaze KROM montras ion, por kio la cetero de la frazo ne validas. Do, se la frazo estas pozitiva, la senco de la escepta Krom estas negativa. Tia pozitiva frazo normale enhavas vortojn kiel: *ciu(j)*, *ĉio*, *tuta*.

Jen kelkaj ekzemploj de escepta KROM:

- Venis al la renkontiĝo ĉiuj miaj geamikoj, krom Karlo.
Vinieron a la reunión todos mis amigos, excepto Carlos.
- Krom libroj pri esperanto, estas troveblaj en la biblioteko libroj pri ĉiuj lingvoj.
Excepto libros sobre esperanto, se pueden encontrar en la biblioteca libros sobre todos los idiomas.
- La tuta revuo estas altvalora, krom la bildoj.
La revista completa tiene un gran valor, excepto las ilustraciones.
- Ĉiuj manifestantoj disiĝis, krom malgranda grupo.
Todos los manifestantes se disolvieron, excepto un pequeño grupo.

Se la frazo estas negativa, tiam la senco de KROM estas pozitiva. Ofte, ĉe la ĉefa frazo troviĝas ofte jenaj vortoj: *ne, neni-, sen.*

- Ĉe mi troviĝas neniuj, krom mia avo.
En mi casa no se encuentra nadie, excepto mi abuelo.
- Ne ekzistas Dio, krom mi.
No hay Dios, excepto yo.
- Mi havas neniom, krom ĉi tiuj malmultaj moneroj.
No tengo nada, excepto estas pocas monedas.
- Hieraŭ mi ne piediris tra la strato, krom dum mia ofta matena promenado.
Ayer no paseé por la calle, excepto durante mi habitual paseo matutino.

- **Aldona KROM**

Ni vidis antaŭe, ke KROM povas indiki escepton. Nun, ni vidu, ke ĝi ankaŭ povas montri ion, kio ja validas, ion, kion oni aldonas al alia afero kiu ankaŭ estas valida. Normale, ĉe la ĉefa frazo troviĝas vortoj kiel: *ankaŭ, ankoraŭ, eĉ.*

- Krom mia amiko Karlo ankaŭ venis en mian domon mia frato kaj mia bofratino.
Además de mi amigo Carlos también vinieron a mi casa mi hermano y mi cuñada.
- La libro ne estas facile legebla kaj krom tio, mi dubas ĉu ĝi estas interesa.
El libro no es de fácil lectura y además de eso, dudo que sea interesante.

Ĉu ekzistas risko de miskompreno inter *escepta* kaj *aldona* KROM? Eble jes, tamen normale la kunteksto klare montras, ĉu temas pri escepta aŭ aldona krom. Se ĉeestas en la frazo vortoj kiel *ankaŭ*, *ankoraŭ* aŭ *eĉ*, temas pri aldona krom; se aperas vortoj kiel *ĉiuj*, *ĉio*, *tuta*, *sen*, *neni-* aŭ *ne*, tiam ni troviĝas antaŭ escepta krom.

- Aliaj uzoj de KROM:

KROMA (adjektivo):

Por rezervi unulitan ĉambron, vi devas pagi kroman kotizon.
Para reservar una habitación individual, debes pagar una cuota aparte.

KROME (adverbe): kun la senco aldoni, plie.

Krome, vi devos pagi plie se vi deziras rezervi unulitan ĉambron.
Además, deberás pagar más si deseas reservar una habitación individual.

Kroma kaj *Krome* havas ĉian aldonan signifon, neniam esceptan.

- Estas eble trovi verbojn kaj substantivojn kiel KROM agadas kvazaŭ kiel prefikso.

KROMPAGI: *pagar aparte.*

KROMFOLIO: *addenda*



Turismi en ... Lanjarón (Granado)

Laŭdire estis la romianoj tiuj kiuj unue loĝis en zonoj apudaj al la nuntempa vilaĝo *Lanjarón* (*lanharón*). Tamen, neniu restaĵo ekzistas pri ties kulturo. Verdire la unua mencio de la urbo okazas en la jaro 1.231 kiam oni parolas pri araba kastelo starigita de la dinastio Alhamaro. En tiu tempo alvenas la unuaj enloĝantoj, berberoj kiuj dum la 13-a jarcento sideĝis en la zono. Ili nomigis la vilaĝon per la nomo “*Al-lancharon*”, kun la signifo “loko de akvo-fontoj”, tiu nomo poste divenis en la hispanlingvan *Lanjarón*.

En la jaro 1.492 Granado, la lasta islama regno en la Ibera Duoninsulo malaperiĝis. Tamen, la novaj kristanaj guberniestroj permesis al la originaj islamaj enloĝantoj resti en la urbo kun ilia propra lingvo, religio kaj kulturo. Ĉio ŝanĝiĝis kiam en la jaro 1567 la kastilia reĝo Filipo la 2-a aprobis dekreton, laŭ kiu estus malpermesita la araban lingvon kaj religion kaj devigis al ĉiuj moriskoj, jen la nomo de la araboj kiuj restis ĉe la novaj kristanaj regnoj, ricevi la kristanan bapton. Do, en la jaro 1.568 la arabaj enloĝantoj de *Lanjarón* kaj de la apudaj zonoj ribeliĝis kontraŭ la reĝo. La ribelado daŭriĝis kvar jarojn kaj en *Lanjarón* okazis un el la plej tragikaj epizodoj de tiu lukto, kiam la moriskoj enirigis en la preĝejon ĉiujn kristanajn enloĝantojn kaj poste ili bruligis ĉiujn. La vilaĝon kaj la tutan zonon rekonkeris S-ro Juan de Austria, frato de la reĝo en la jaro 1.571.

Komence de la 19-a jarcento la vilaĝo defendis sin kontraŭ la napoleonaj trupoj. Estis tre fama epizodo dum tiu lukto, kiam la enloĝantoj de *Lanjarón* uzis antikvan kanjonon por defendi la centran placon de la urbo. Ekde tiam, la *lanjarón*-anoj estas konataj kiel “*cañoneros*” (*kanjonistoj*). Fine de tiu jarcento terura tertremo kaŭzis grandajn damaĝojn en la vilaĝo. En la 20-a jarcento oni starigis banstacion kaj oni diskonigis la kvaliton de la akvoj de *Lanjarón*, kiu

nuntempe estas konata ĉefe dank'al tiu ban-loko kaj al la komercado de la akvo.



Blazono de Lanjarón

Monumentoj:

- Ban-stacio:

Starigita meze de la pasinta jacento, nuntempe ĝi estas ankaŭ 4-stela hotelo. La kvalito de la akvoj kaj banejoj de *Lanjarón* estas konataj en la tuta mondo. La vilaĝo estas plena je akvo-fontoj kaj ĝi estas la plej grava motoro de la turismo kaj la ekonomio de la vilaĝo.

- Muzeo de l'akvo:

Temas pri muzeo dediĉita al la plej grava allogaĵo de *Lanjarón*: la akvo. Ĉe kvar salonoj estas eble koni aferoj kiel la vojo de la akvo, la memoroj kaj la historio de la akvo en la urbo. Krome, ĉi tiu muzeo estas la elirejo por realigi promenadon tra la rivero *Lanjarón*.

- La kastelo:

Bedaŭrinde, nuntempe nur ekzistas ruinaĵoj de konstruo pri kiu oni diras, ke ĝi estis araba kastelo. Tamen, verŝajne temas pri pli posta kristana konstruaĵo. Nuntempe nur estas eble vidi la eksterajn muregojn.

- La akvo-fontoj:

Dudeko da fontoj, kun freŝa kaj altkvalita akvo, etendas laŭ la stratoj kaj placoj de *Lanjarón*. Sur multaj el ili estas eble legi poemojn de la granada poeto Federico García Lorca.



Ban-stacio de *Lanjarón*

Gastronomio:

Kaŝtanoj kaj migdaloj troviĝas en multaj receptoj en *Lanjarón*, tiel la migdala supo kaj la legoma kuirajo kun kaŝtanoj. Ankaŭ estas eble trovi, kaj manĝi, bongustajn kaj aromajn fenkolojn. Se vi ŝatas viandojn, ne hezitu gustumi rizon kun kuniklo kaj kapridon kun ajloj.

Festoj:

La plej konata festo en *Lanjarón* okazas la 24-an de junio, festo de Sankta Johano. Dum la nokto de tiu tago okazas la tradicia “*carrera del agua*”, “akvo-kurado”, tiam litroj da akvo falas sur la ĉeestantoj en la festo.



ALIGU AL *Andaluzia Esperanto-Unuiĝo*

Se Vi deziras kunlabori en la disvastigado de la internacia lingvo en Andaluzio, jen Via asocio.

Por aliĝi al AEU kontaktu kun: esperanto14@ono.com
Jara Kotizo: 20 € pagebla ĉe la jena konto:

- Banco BMN (eksa Caja General de Ahorros de Granada)
ES80 0487 3225 1420 0000 6979

Okaze de la pago de la jara kotizo bv. informi pri la jenaj sciigoj:

- Nomo de la aliĝanto.
- Afero: Kotizo 2017

DANKON! Ni bezonas ĉies helpon kaj apogon.



Andaluzia Esperanto - Unuiĝo

Asociación Andaluza de Esperanto


Paĝoj pri Nia Historio

Notoj pri Esperanto kaj Andaluzio

Aureliano del Castillo y Beltrán

Granado 1872 ~ 1922

En la jaro 1912 alvenis al Granado, ĵus promociita, la kapitano Miguel Pérez Alcorta. En sia lasta milit-posteno en la urbo Kordovo, li kunhelpis la organizadon de la esperanto-movado kaj li eĉ prelegis ofte pri esperanto kaj teozofiaj aferoj, siaj du grandaj ŝat-okupoj. Sur venonta numero ni parolos pri ĉi tiu elstara samideano, tamen ĉi tiun paĝon ni deziras dediĉi hodiaŭ al unu el la esperantistoj kiujn li renkontis kiel li alvenis en Granadon, S-ro Aureliano del Castillo y Beltrán.



Kiel dirite en 1912 alvenis al Granado aktiva samideano, preta disvastigi la internacian lingvon kaj tuj ekigi kursojn, ĉar tio mem ankaŭ plenumis en Kordovo. Do, tuj li kontaktis kun la granadaj esperantistoj, ĝis tiam izolitaj kaj li proponis organizi serioze la aferon disvastigi la zamenhofan lingvon. Tiel, komence de la jaro 1913, ĝuste la 26-an de januaro, renkontiĝis tiuj unuaj granadaj esperantistoj kaj fondiĝis la *Grupo Esperantista de Granada*. Inter la ĉeestantaj esperantistoj kaj apartenanta kiel voĉdonanto al la nova estraro, troviĝis S-ro Aureliano del Castillo y Beltrán.

Aureliano del Castillo naskiĝis en granada vilaĝo, Jerez del Marquesado en la jaro 1873. Li sekvis studojn en la lingvistika

fakultato de la Universitato de Granado kaj tuj poste li atingis oficialan postenon kiel direktoron de la centra biblioteko de la Universitato. Li ankaŭ verkis kiel romanisto kaj ĵurnalisto. Li kunlaboris ofte en la ĵurnalo *El Defensor de Granada*, kie li fakis pri muzika kritikado. Li ankaŭ verkis artikolojn en aliaj gazetoj kiel *El Eco de Granada*, *Gaceta del Sur*, *La Publicidad*, *La Alhambra* kaj *La Verdad*. Lia agado kiel ĵurnalisto estis tiel agnoskita, ke li kunlaboris en la fondiĝo de la Asocio de Ĵurnalistoj de Granado, kie li atingis la postenon de vicprezidanto.

Kiel romanisto, li verkis *Marigracia* (1921) kaj impona studo pri la milito en Flandrio. Li mortis e la jaro 1922, 49-jaraĝe. En la nekrologo eĉ la granada poeto Federico García Lorca omaĝis lin. Tiel, la mondfama poeto diris: *“Li estis granada kavaliro, katolika kaj sincera, ĝentila kaj bonedukita kaj kun klera parolado. Li uzis mantelon kaj ĉapelon kaj li havis tian oldan aspekton de la romantikuloj. Li kapablis eniri sen gvidanto en la blujajn kaj vastajn labirintojn de la arto”*.



Noto de la Redakcio: *Nia fidela leganto kaj amiko Julio Herrero Segura atentigas nin pri kelkaj ne-ĝustaj datumoj aperintaj en nia pasint-numera artikolo pri Serafín Baudín Agüero, ĉefe pri la naskiĝo de S-ro Baudín. Nia samideano eĉ proponas pli detalajn konitaĵojn. Tiu helpo ebligas nin aperigi pli detalan artikolon pri S-ro Baudín en unu el niaj venontaj numeroj. Multegajn dankojn JULIO !*

FLAMENKO

La Taranto

La vorto *taranto*, en la hispana lingvo “taranta”, estas nomo kiun oni atribuas al la enloĝantoj de la provinco Almerio. Alcalá de Wenceslada, aŭtoro de la verko “Vocabulario Andaluz” (*Andaluzia Vortaro*), difinas *taranta* kiel kantaĵo tipa el Almerio. Reale, la taranto estas tipa ne nur el Almerio sed ankaŭ el la Levantena regiono (Murcio kaj Valencio). Pro tio, la origino de la tarantoj ne rilatas rekte al flamenko, la taranto flamenkiĝis poste.

Laŭ esploristoj de la flamenka arto, la flamenkiĝo de la tarantojn unue kantaĵo el Levanteno, okazis jene:

- Proksimume la jaro 1890 ministoj de Jaeno, Granado kaj Almerio elmigras en la minejojn de la provinco Murcio.
- La almeriaj fandangoj fandiĝas kun kantaĵoj tipe flamenkaj, kiel la malaganaj kantaĵoj kaj la fandangoj de Luceno (Kordovo).
- Fine de la 19-a jarcento, la flamenka kantisto de Alakanto, Antonio Grau Mora “*Rojjo, el Alpargatero*”, ludas la unuajn flamenkigitajn tarantojn.

Do, pro la fakto, ke la unuaj popularaj ludantoj de ĉi tiu nova flamenkigita kantado estis ministoj, la zonoj kie oni aŭdas la unuajn tarantojn estas triangulo kun tri punktoj: la minejoj de Linares (Jaeno) de Almagrera (Almerio) kaj Cabezo Rajado (Murcio), jen la tri plej gravaj ministaj zonoj en la orienta parto de Andaluzio kaj Murcio.

Dum la unuaj jaroj, ĉi tiuj kantaĵoj estas konataj kiel kantoj *cartageneras-murcianas* (kartagena-murciaj), tamen dum la jardeko dua de la pasinta jarcento jam aperas gramfon-disko sub la nomo “Taranto”.

Post la unua kantisto, *Rojo el Alpargatero*, tiu kiu disfamigis la tarantoj estis *Antonio Chacón* kiu ludis ĉi tiun novan kantaĵon en la flamenkaj rondoj. Post li, aliaj kantistoj kiel *El niño de Cabra*, *Manuel Vallejo*, *El cojo de Málaga*, *La niña de los peines*, ktp, levigis la kvaliton de ĉi tiu kantaĵoj, kiu naskiĝis sub-tere kaj el la animo de la suferantaj ministoj.

Ekde la jaro 1964 okazas en la urbo Linares, fama antaŭ-tempe pro la minejoj, la Nacia Konkurso de Tarantoj, kie estas eble partopreni ne nur kiel kantisto, sed ankaŭ kiel verkisto de strofoj por tarantoj. La tarantoj estas formataj de strofo kun kvin vresoj, ripetigas ĉiam unu el ili, ĉu la unua, ĉu la dua.

Taranto de *El cojo de Málaga*

Same kiel salo por kuirajo,
mi bezonas vian amon, kunulino.
Same kiel salo por kuirajo,
kiel por nudulo vestaĵo,
kiel akvo por kamparo,
Ve! Kiel por ministoj, la mino.

Jen la strofo kiu atingis la unuan premion en la Linaresa Konkurso de Tarantoj en la jaro 2016:

En la minejo regas ĉefo
stresanta kun uzur'.
En la minejo regas ĉefo
sia deziro LA MONO nur.
Por li gravas nur sia vivo
ne kies laboras kun karbur'.

ANDALUZIA KUIRARTO

Pipirrana

Baldaŭ venos pli varmaj tagoj kaj estos eble ne nur trovi gazpaĉon ĉe la andaluziaj manĝo-tabloj. En Jaeno, Granado, Almerio kaj eĉ en Kadizo, estos eble gustumi freŝan *pipirrana*, temas pri salato kiu aspektas kiel gazpaĉo. Ni preparu hodiaŭ *pipirrana* laŭ la jaena stilo:

Jen la necesaj ingredientoj:

- Tomatoj: 2 kilogramoj.
- 3 verdaj italaj paprikoj.
- Granda kukumo.
- Granda cepo.
- Oliv-oleo: 250 ml-oj.
- Jerez vinagro: 60 ml-oj.
- Salo.



Jen la preparado:

Ne estas eble trovi kuirafon kun pli facila preparado.

- 1.- Post lavi tre bone ĉiujn legomojn (tomatoj, paprikoj, kukumo kaj cepo), oni tranĉas ĉion laŭ malgrandaj kubetoj.
2. Ni metas ĉiujn legomojn tranĉitajn ene de granda telero kaj ni aldonas vinagron, oliv-oleon kaj salon.
- 3.- Ni miksas ĉion kaj poste ni gardas la teleron en la fridujon. En la momento kiam ni manĝos la *pipirrana*, ĝi devas esti tre freŝa. Uzu kuleron por manĝi ĉi tiun kuirafon.
- 4.- Oni povas aldoni, sed ne necese, malmole kuiritan ovon kaj tunon.

Ĉi-recepta vortaro:

Tomatoj



Verdaj italaj paprikoj



Ĉepo



Kukumo



Oliv-oleo



Salo



Vinagro



Granda telero



Fridujo



Kulero



Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio

La kolombo-pafadejo en Jabugo (Onubo)

Antaŭ kelke da tempo, dum televid-programo pri misteraj aferoj, esploristo pri ĉi tiaj temoj asertis, ke neniu lando egalas al Andaluzio por “turismo” ĉe misteraj etosoj, ĉar ĉi tie eblas trovi en kiu ajn vilaĝo, domojn, konstruaĵojn kaj lokojn plenaj je misteroj. Posta demando rekte farita al esploristo estis:

- *Kaj en kiu loko de Andaluzio, vi sentas pli da timo?*

La respondo estis tuja: “*sendube en la kolombo-pafadejo de Jabugo en Onubo*”. Kompreneble, la dezirojn koni pli pri tiu loko ekaperis kaj pro tio estis necese diveni kio okazis kaj kio okazas en tiu loko.



Nobela familio starigis ĉi tiun konstruaĵon por inviti la reĝon Alfonso la 13-a ĉasi kolombojn. Temis pri okupo tre ŝatata de nobeloj kaj riĉuloj ekde la 19-a jarcento. La arkitekto estis Anibal González, fama pro la paviljonoj kaj konstruaĵoj starigitaj en Sevilo dum la

Iberoamerika Ekspozicio de la jaro 1929. La reĝa familio vizitis ofte tiun lokon, ĝis kiam en la jaro 1931 oni proklamis la hispanan respublikon kaj la gereĝoj kaj familio ekziliigis.


La unuan mencion pri strangaj okazintaĵoj en tiu konstruaĵo aperigis la loka historiisto Jorge Medina, kiu aŭskultis el la enloĝantoj de Jabugo, ke ĉe tiu domo estis eble vidi strangajn lumajn siluetojn tra

la fenestroj. Li eniris en la konstruaĵon kaj laŭ li, senco pri viglado kaj observado estis konstantaj, li eĉ aŭskultis voĉon kriantan sian nomon kaj inviton eniri en la lokon. Kompreneble, li forfuĝis, sed li ekstudis pli profunde la lokon.

Li eltrovis, ke post la civila milito la konstruaĵo utilis kiel sanejo kaj poste kiel orfejo kaj dum kelke da tempo tie estis specialaj ĉambroj por dementuloj. Tiam, estis ofte aŭdi en la apudaj zonoj kriojn de la malsanuloj, kelkaj el ili forpasis. Aliuloj parolas pri maljuna gradisto kie laboris tie kaj laŭdire, li ankoraŭ protektas la lokon, eĉ post sia forpaso.

Alia enloĝanto de la vilaĝo asertis, ke dum semajnfino li promenadis apud la konstruaĵo kaj tie li aŭskultis miaŭon. Li pensis, ke temis pri malgranda kato bezonanta helpon kaj li eniris en la lokon. Laŭ li diris, tuj la pordoj ekfermiĝis kaj malfermiĝis, temis pir la plej malbonaj momentoj en la vivo de tiu homo.

Verŝajne, ankoraŭ mankas serioza studo pri la historio de tiu konstruaĵo, pri la tiamaj najbaruloj kiuj loĝis tie. Tamen, ĝis tiam kaj laŭ spertuloj pri misteraj aferoj, ĉi tiu estas la plej terura domo en la tuta Andaluzio.



Krucvortenigmo

	A	B	C	Ĉ	D	E	F	G
1								
2		■				■		
3							■	
4					■			
5			■	■				
6				■				
7							■	
8								

1. Sen la lasta vokalo, granda kvarpieda danĝera rampulo.
2. Vokalo ■ Sen la lasta vokalo, muskola kava organo kiu pumpas la sangon tra la korpon. ■ Adverbo esprimanta, ke oni malakceptas.
3. Cilindro el volvita sorbopapero uzata en desegnado, por malpliintensigi strekojn de kraĵono. ■ Konsonanto.
4. Osto de la piedo. ■ En kiu loko?
5. Prepozicio montranta la lokon internen de kiu almoviĝas io aŭ iu. ■ Sen la lasta vokalo, pli-mapli longa konusa malmola estaraĵo kiu kreskas sur frunto aŭ alia parto de la kapo de hufuloj.
6. De li. ■ Inverse, granda laŭ la tria direkto, kiu estas nek larĝo, nek longo.
7. Malgranda, multpieda krustulo. ■ Vokalo.
8. Akuzative, monato de la jaro.

- A. Plurale, fortikigita loĝloko, defendta per fosaĵo, remparoj kaj turoj.
 B. Konsonanto ■ Adjektive, glukozido de gajlata acido, troviĝanta en multaj vegetaloj, la ĉefa aganto de tanilo.
 C. Inverse, difinita parto de spaco kie troviĝas persono aŭ objekto. ■ De ni.
 Ĉ. Interpunkcia signo. ■ Inverse kaj mallongigite, la plej fama renkontiĝo de la esperantistaro.
 D. Inverse, prepozicio montranta la kaŭzon de ago. ■ Adjektive, monkesto.
 E. Konsonanto. ■ Inverse, franca arkitektura kaj omama stilo.
 F. Inverse, persona pronomo. ■ Moviĝi per piedoj, flugiloj, naĝiloj... ■ Vokalo.
 G. Akuzative, rakonto pri malnovaj okazintaĵoj, en kiu la historiaj faktoj estas intermiksita kun imagitaj mirindaĵoj.

Solve al la pasintnumera krucvortenigmo.

	A	B	C	Ĉ	D	E	F	G
1	T	E	R	T	R	E	M	O
2	E			A	I	L	A	P
3	N	O	R	O	T	A	R	O
4	T	R	E		O	S	T	R
5	I	G	A	O	R	T		T
6	A	A		I	N	A		U
7	O	N	A	T	E		I	N
8	J	E	N		L		S	E

Por kontakti kun la revuo, bv. uzi
jenan adreson:

esperanto14@ono.com



HUMURO



La numero 104-a de nia revuo aperos dum la monato majo 2017. Ni dankas Vian kunlaboradon, ĉar la eldonado de revuo nur estas ebla se ni ĉiuj kunlaboras. DANKON !

esperanto14@ono.com

GAZETO ANDALUZIA
Apartado de Correos 3142
14080 CÓRDOBA (Andaluzio – Hispanio)

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo
Asociación Andaluza de Esperanto



Andaluzia Esperanto-Unuiĝo estas la asocio kiu strebas al la disvastigo de la internacia lingvo Esperanto en Andaluzio.

Ĝi fondiĝis en la jaro 1984a danke al la iniciato de geesperantistoj de la provincoj Malago, Sevilo kaj Kordovo. Hodiaŭ apartenas kaj kunlaboras kun A.E.U. geesperantistoj de la tuta Andaluzio kaj eĉ ekster ĝi.

Estraro

Prezidanto : Angel Arquillos López
Vicprezidantino: Fátima Jiménez García
Sekretario: José María Rodríguez Hernández
Kasistino: María Dolores Torres Mateo
Voĉdonantoj: Jordi Lietor López
Antonio Rodríguez Gasch
Juan García del Río

Adreso: C/ Ánfora 6 5-D 29013 Málaga

E-Adresoj: angelarquillos@gmail.com
esperanto14@ono.com

TTT-paĝo: www.esperanto.ac

Blogo: www.andaluciaesperanto.blogspot.com

Aliaj utilaj adresoj de la Esperanto-Movado

* Universala Esperanto-Asocio
Nieuwe Binnenweg 176 NL-3015 BJ Rotterdam (Nederlando)
uea@inter.nl.net

* Hispana Esperanto-Federacio
C/ Rodríguez San Pedro 13-3-7 28015 MADRID (Hispanio)
admin@esperanto-es.net

2017, jarcento de la morto de
la aŭtoro de Esperanto



Ludwik Lejzer Zamenhof (1859–1917)